# EKO 2024

TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO

**Numero 2024:31; aŭgusto 14.**

Pezo: Word 40, PDF 260 KB, Alkroĉaĵo: FC 129 KB HT 183. Sume 612 KB


## Pola Radio raportas pri la Tago de Lernado

En nia marda raporta elsendo pri la 109-a UK en Aruŝo la ĉefan atenton ni donas al la Tago de Lernado, kiu okazis ankaŭ por la eksterkongresa publiko pere de la platformo *Zoom*. Ni citas el ĝi voĉojn el la prelego pri la burunda instruado de Esperanto kaj el alparolo de Katalin Kovats pri serĉado de kunlaborantoj por la projekto de edukado.net: *Ekarolu*. Atenton ni donas al la Festparolado de la prezidanto de UEA, Duncan Charters, kaj al la agadsufloroj de la Honora UEA-prezidanto, Humphrey Tonkin. En la programo gastas TEJO-estranino Snehaĝa, kiu informas pri junuloj dum la 109-a UK kaj la marda sinprezento de TEJO. Uzante la registraĵon de Fritz Hilpert ni citas sondokumente la vortojn de Kongo DR esperantista junulo, kiu varbas ĉe la kongresa libroservo por afrika literaturo en Esperanto. Ni ekscias, ke iu el la plej popularaj trinkaĵoj de la mondo, servata ankaŭ dum la trinkmanĝa nokto de la 109-a UK, estas kokakolao, kiu historie ligiĝas kun lia familio. Nian programinformon akompanas afiŝo emfazanta la pacdeziron de la esperantistoj. Grave, en la 75-a datreveno de la faligo de la unua atombombo sur Hiroŝimon.




Barbara Pietrzak

Jam estas alŝutita la registraĵo de la Tago de Lernado en la jutuba kanalo de ILEI.
https://www.youtube.com/watch?v=bDWIx4lMqOQ

## Indiĝenaj popoloj en la fokuso

Niaj ĝenevaj kolegoj partoprenis la kunvenon de EMRIP (Eksperta Mekanismo pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj). Mireille Grosjean kaj Stefano Keller sendis al mi bonajn raportojn pri la kontaktoj, kiujn ili faris en la lastatempa UN-kunveno en Ĝenevo pri la rajtoj de indiĝenaj popoloj. Jen raporto pri la kunveno aranĝita de UEA k.a. pri indiĝenaj rajtoj kunlige kun la Altnivela Politika Forumo (HLPF) de UN. Tiu kunveno estis organizita de UEA kun helpo de la Neregistara Organizo (NRO) *SIL International* kaj diversaj aliaj kolegoj. Ni sukcesis arigi eminentan grupon de parolantoj. Stefano memorigis min pri la neceso ĝisdatigi kelkajn paĝojn en nia retejo. Se vi havas sugestojn pri tiuj aferoj, bonvolu skribi al Rafael (adreso supre) kaj mi. En Novjorko, intertempe, okazis Flanka Evento de la Altnivela Politika

Forumo, ankaŭ rilata al indiĝenaj aferoj, nome pri la Jardeko (de Unesko) pri Indiĝenaj Lingvoj, pri kiu mi jam informis vin, UEA estis inter la sponsoroj kaj nia reprezentanto Francis Hult prezidis. Mi salutis (en Esperanto, kun interpreto) nome de UEA. La teksto estas alkroĉita en Esperanto, la a,gla kaj la franca.

Humphrey Tonkin.

## Eksteraj rilatoj

Laŭ ĵusa decido la labor-grupo pri eksteraj rilatoj, post interkonsultiĝo kun Humphrey Tonkin, estis kreita kun la kernaj homoj, François Lo Jacomo, Humphrey Tonkin, Francis Hult kaj Rafael Lima, kiuj diskutos baldaŭ pri la membrigo de pliaj homoj.

Renato Corsetti

## Fondaĵo Canuto alportas rekordan nombron da membroj

La fondaĵo subtenis ĝis nun 758 personojn: 513 en Afriko, 79 en Ameriko, 49 en Azio, 70 en Eŭropo, 47 en MONA.
Ni alkroĉas la raporton (1-paĝa, 129 KB), kiu montras liston de la subtenataj landoj.

## Aŭgusto aŭguras favore en Pollando

Jen la programo interlingvistika dum la Internacia Lingvista Kongreso, sur la paĝoj 5 kaj 6 de la sekva gazeto:
https://icl2024poznan.pl/userfiles/file/ICL_2024_Programme_draft_02_Aug_names.pdf

Post ĝi okazos la lasta kultura festivalo Arkones. Vi estas bonvenaj!

Ilona Koutny

***SMG:*** Arkones estas brila renkontiĝo. Mi plurfoje ĝuis la partoprenon. Ĝi estis la centr-eŭropa ekvivalento de la siatempa dana artfestivalo, kiu ĉefe servis al la okcidenteŭropaj popoloj.

## Plia nova revuo en Afriko

Mi prezentas al vi nian informilon, ***Konga Stelo,*** kiu entenas svahilajn salutojn. Kiel kelkaj el vi scias, la Esperanto-movado en Kongo-Kinŝaso havas plurjaran ekziston sed esperantistoj laboras unuope aŭ grupe en fermitaj kluboj aŭ asocioj, nesciante pri kluboj en aliaj landpartoj. Do, DKEJO kaj ILEI opiniis, ke eldono de informilo,estos paŝo progresen en la tutlanda Eo-movado, ĉar ĝi provizos ĉiam informojn pri la evoluo de nia movado tra la lando kaj favorigos kongolandanojn plu aktivi kaj rilatiĝi kun samlandanoj. *Konga Stelo* enhavos novaĵojn pri ĉiuj poresperantaj aktivaĵoj, kaj do ni kunlaboros kun ĉiuj Eo-asocioj kaj kluboj de Kongo por riĉigi ĝin kaj pluvivigi nian trimonatan revuon. Jen la ligilo al ĝi:

https://uea.org/vikio/Dosiero:KONGA_STELO_REVUO.pdf

Viaj kritikoj, sugestoj kaj konsiloj helpos plibonigi la duan revuon.

Joel Muhire, la redaktoro.

*La Voĉo de Kilimanĝaro* estas la ĉiutaga Kongresa Kuriero de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo, Tanzanio. Legu ĝin por trovi informojn pri ĉiuj programŝanĝoj, raportoj pri pasintaj kaj venontaj eventoj. Tio helpas vin pli bone

orientiĝi kaj pli agrable kongresumi. Prikongresaj artikol(et)oj kaj ankaŭ fotoj viaj estas bonvenaj kaj dankataj al la retadreso: arusho.kuriero@gmail.com. Ĉiuj numeroj de la Kuriero estos haveblaj en la retejo de UEA: https://uea.org/ kongresoj.

Adjévi Adjé,Redaktoro de la ĉi-jara Kongresa Kuriero

## Informilo pri la agado ĉe UN

Dank' al la kunlaboro de kelkaj membroj de nia laborgrupo, la dumonata Informilo nun aperas regule en tri lingvoj: angla, franca, Esperanto. Sofia Soskina prizorgas ĝian regulan sendadon rete, en ĉiuj tri lingvoj. Se vi havas proponojn por aldonoj de ricevantoj de la informilo (ekzemple kontaktoj kiujn vi faris en UN/Unesko, aŭ aliaj interesatoj kiuj pretus regule ricevi la informilon retpoŝte), sendu la adresojn al Sofia: Soskina sofiyasoskina@optonline.net.

Humphrey Tonkin

## Facile kaj gracile

https://uea.facila.org/artikoloj/movado/esperanto-en-jun-kora-urbo-r438/

https://uea.facila.org/artikoloj/lingvo/tago-de-la-svahila-lingvo-r439/

https://uea.facila.org/artikoloj/movado/paralela-universo-r441/

https://uea.facila.org/artikoloj/lega%C4%B5oj/lasu-vian-po%C5%9Dtelefonon-%C4%89e-la-pordo-r440/

## La lego-lukto pluiras

La 88-a Internacia Esperanto-Sumoo okazis inter la 14-a kaj 28-a de julio. Partoprenis 275 personoj el 37 landoj kaj unu regiono. Rekorde kaj malsuprize estas la japanoj kun 54 legintoj de Eo-literaturo. Sekvis Francio (33), Koreio (30), Ĉinio (20), Brazilo (19), Pollando (15) kaj Germanio (14).

## La merkato – eldonaĵo de IKEF

Jen ligilo de la 106-a numero de *La Merkato*

https://www.ikef.info/post/la-merkato-n-ro-106

John Huang  Redaktoro de *La Merkato, Toronto, Kanado'* **Retejo**: www.ikef.info; www.ikef.net

## Kursa ekskurso tra Francio

La redaktoro de edukado.net informas vin, ke aldoniĝis novaj eroj ĉe la Kursejo.

Nomo:   Reta paroliga kurso
Gvidantonomo: Paul Quevy; Aldoninto: Paul51
Loko: Reims, Francio

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27645

Nomo: Club Espéranto Le Beausset
Gvidantonomo: Lafitte Nicole
Loko:  Le Beausset, Francio. Aldoninto:  mirann

Vi trovos ĝin rekte en la paĝo: https://edukado.net/kursejo?kid=27648

## Filmo afrika en preparo

Mi ŝatas informi al vi pri mia tria filmo, kies manuskriptoj jam estas pretaj, sed ni ankoraŭ bezonas vian monhelpon por realigi tiun belan filmon. Via mondonaco ebligos al ni lui kameraon, reflektilon, voĉilon ktp. La titolo de la filmo estus *La forlasita virino* aŭ *La malfacila vivo de virino*, tiel Dankon Kwibe prezentas la projekton. Vidu ĉe: https://www.esperanto-afriko.org/category/dokumentoj/unuopaj-projektoj/

Sendis Adj€ Adjévi

## Memore al Litova pioniro

La 27-an de julio 2024 en la urba muzeo de Švėkšna (Litovio) estis inaŭgurita ekspozicio, dediĉita al la eminenta litova pedagogo, landesploristo kaj esperantisto **Petras Čeliauskas**, kies nomon havas unu el la salonoj de la 109-a Universala Kongreso de Esperanto en Aruŝo. Legu prian artikolon de Povilas Jegorovas en *La Ondo de Esperanto:* https://sezonoj.ru/2024/08/litovio-74/

========= vortoj: 1101 =========

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj

Universaleco, Instruistoj, Fervojistoj, Medicinistoj, Komercistoj, Blinduloj, Kolektantoj

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: https://www.ilei.info/agado/EKO.php

**La unuaj tridek numeroj de 2024 nun aperas tie, kune kun la kolekto el 2023**

**ALDONU Aŭ SUBTRAHU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apertenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadresoj estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.